

Centra Organo de Japana Esperanto-Junularo fondita en 1992 Landa Sekcio de TEJO

# LA JUNULOJ

*Januaro 2013 N-ro 97*



**IJK 2012 en HANOJO**  
kaj  
**Elekto de Estraranoj de JEJ**

# LA★JUNULOJ



## La 68-a IJK en Hanojo, Vjetnamio

De la 5a ĝis la 11a de aŭgusto en 2012 okazis la 68-a Internacia Junulara Kongreso en la ĉefurbo de Vjetnamio, Hanojo. Oni diras, ke IJK havas ĉarmon malsaman ol Universala Kongreso (UK). Efektive ankaŭ mi redaktoro partoprenis en la IJK. La onidiro pravas. Tiam partoprenis ĝin multaj junuloj el diversaj landoj; precipe el Azio.

Esperanto estas komuna lingvo, kiu apartenas al neniu lando, kaj aliflanke vortoj de la lingvo ofte devenas de Eŭropo. Malgraŭ tio, multaj azianoj elektis la lingvon, kaj parolis esperante kun diversaj landanoj en la IJK.

### antaŭparolo de Redakcio

Ni lernas Esperanton ne nur por babili. Ni kune ĝuis programerojn, kaj dume interparolis por interkompreni unu la alian. Ĝenerale inter azianoj unu distanco ekzistas, ĉar ni respektive havas tian denaskan lingvon, kia malsimilas al aliaj. Tamen kiam ni parolas esperante, malaperas la distanco. Ni tiam provas interkompreni pli profunde.

La Junuloj n-ro 97 havas raportojn de la IJK. Krome, 2 intervjuojn ĉi-numero ankaŭ havas. Bonvole ĝuu.

En lasta paĝo estas grava informo pri elekto de estraranoj de JEJ. Ne pretervidu, ni petas.

正会員20名、賛助会員36名(2013年1月20日現在)

Regulaj membroj: 20, Subtenantoj: 36. (je 20 jan. 2013)

会費振込

ゆうちょ銀行振替口座 : 00140-8-755070

加入者名 : JEJ

会費 :

正会員(35歳未満) 1500円/年

高校生まで 400円/年

新規入会者 750円/年(初年度のみ)

賛助会員(35歳以上) 2000円/年

Ĝiri kotizon

Japana poŝtografia konto, Numero: 00140-8-755070

Nomo de konto: JEJ

Kotizo:

Regula membro (malpli ol 35-jaraĝa) 1500 enoj/jaro

Ĝis altlernejo 400 enoj/jaro

Novmembriĝinto 750 enoj/jaro (nur en la unua jaro)

Subtenanto (35-jaraĝa kaj pli) 2000 enoj/jaro

あなたも記事を書いてみませんか？

La Junuloj では皆様の投稿やご感想を募集しています。裏表紙記載のあて先までお送りください。

aŭtoroj: Iwama Kyo, Ĉe Juna, Muramatsu Shinya, Tamura Yasuyuki, Mamiya Midori (red.)



### Raporto de Kyo IWAMA

Kiel oni scias, la lasta IJK okazis ne en Japanio, sed en Vjetnamio.

Komence, la lasta IJK povus okazi en Japanio. Ĉu vi ankoraŭ memoras tion? Kelkaj LKK-anoj diligente laboris por okazigi IJK en Japanio, sed bedaŭrinde, pro multaj malfacilaj nesolveblaj problemoj ili decidis nuligi IJK en Japanio. Mi vidis la finan parton pri tio, ĉar mi tiam estis unu el la LKK-anoj.

Kaj pro tio la lastjara IJK estis iom speciala por mi. Antaŭ ol veni al Vjetnamio, verdire, mi havis maltrankvilon, ĉar mi ne konis kiel aliaj partoprenantoj sentis pri la nuligo.

Sed en malferma soleno troviĝis unu programero, saluto el diversaj landoj. Mi salutis al ĉiuj partoprenantoj kiel reprezentanto de japanoj. Post la saluto mi aldonis pardonpeton pri la nuligo, kaj subite ili min akceptis tiel tre varme kiel booooooooooh. Mi tre surpriziĝis pro ilia akcepto kaj sentis ĝin tre varma. Mia maltrankvilo tiam malaperis, kaj mi povis ĝisfunde ĝui la specialajn 7 tagojn.

Do, mi volas skribi pri unu kortuŝita memoraĵo de IJK.

Tio okazis en ferma soleno. Kompreneble ĝis tiam al mi venis tiel multaj bonaj memoraĵoj kiel mi ne povis kunporti, sed en la fino de ferma soleno, organizantoj kaj helpantoj de IJK kune kuniĝis kaj stariĝis antaŭ la partoprenantoj. Tiam mi unuafoje vidis ĉiujn organizantojn kaj helpantojn. Ili nombris 30 aŭ 40!! Fakte multaj el ili estis komencantoj, kiuj eklernis Esperanton eble antaŭ kvar aŭ kvin monatoj, kaj multaj estis studentoj. La kvanto de homoj sufiĉis por surprizi kaj kortuŝi min. Multe da aplaŭdo kaj gratulo brakumis kaj kortuŝis ilin. La scenon tre freŝe mi konservas en mia koro.

Se al JEJ apartenus same multe da junuloj kiel Vjetnamio, ni facile povus organizi... Kompreneble, ekzistis multaj kialoj por nuligi IJK. Sed unu el la plej gravaj problemoj estis manko de homoj. Tion mi sentas forte. Se ni okazigus IJK en Japanio *iam*, ni devos akiri multajn esperantistojn, precipe junajn. Kompreneble tio estas tre malfacila same kiel la okazigo mem. Sed se ni konkerus la malfacilaĵon, tiam okazos IJK en Japanio. Mi kredas tion sincere.



▲ Aŭguste en 2012, la 68-a Internacia Junulara Kongreso okazis en Hanojo, Vjetnamio. La dekstra estas helpantoj de la IJK.



▲ Komence de la IJK, ĉiu reprezentanto salutis laŭvice. Salutas Michael Boris Mandirola, estrarano de TEJO.

► Iwama Kyo salutas kiel reprezentanto de japanoj.







▲ "Etna Vestaĵo" Partoprenantoj el diversaj landoj portas sian etnan vestaĵon: maldekstre, rusino, burundano, indonezianoj kaj vjetnamino.



Dutaga ekskurso en la montaro Ba Vi.

◀ Partoprenantoj grupe faris flagon de sia grupo. En la kampadejo, ni tuttage ĝuis ludon, dancon, konkurson...

▶ "Perfekta Paro" Dek paroj estis elektita lote el partoprenantoj, kaj ili konkuris en kvizo, danco, ktp. Tiu ĉi paro, vjetnamino kaj japano, akiris la titolon.



◀ Leciono por komencantoj

La instruisto estas Tatjana Loskutova, kiu iam plurfoje instruis Esperanton por azianoj. Ankaŭ komencantoj multe partoprenis en la IJK. En la foto la ekrano diras "Saluton!" Infano kaj sinjorino tie lernis la lingvon kune.

Por instrui al lernantoj la vortojn, "nova" kaj "malnova", ŝi prezentis sin, kiel "malnova esperantisto". La frazo surprizis kelkajn lernantojn. Ŝi aldiris, "Oni honore uzas la frazon, ĉar malnova esperantisto signifas veterano. Atenton. Mi ne ridetos, se vi vokos min, 'maljuna esperantisto'."

### Raporto de 田村 康之

ハノイから自宅に帰り着いた私は疲労感とともに寂寥感を覚えた。かつて、同じような感覚を持った経験がある。学生時代のクラブの合宿の後である。年齢57にして、30年以上前の経験と同じ気持ちを持つことになった。IJKはまさに合宿であった。

大会期間中に同室となったのは、62歳のフィンランド人 Rifo と25歳の韓国人 Benijo である。Rifo は、胴回りが私の3倍はあろうかという巨漢で、腕だけでなく指にもタトゥーがあり、自分のことを *malbona esperantisto* という。半袖シャツの袖をまくと、緑色の★のタトゥーがあるお茶目さんでもある。Benijo はお洒落な青年であった。一週間、彼らと文字通り寝食を共にした。

オークションで『VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO』という本が出品されたとき、私が初心者であることを知っている Rifo は、私の耳元で「Bona libro.」私はその本を落札した。

帰国の日、一足先に空港へ向かう Benijo の肩を抱き、3か月

後にはファッションの勉強のためイタリアへ留学するという彼に「がんばれよ」と囁いた。思わずそのような行動をとった。数々の講義や行事の一コマコマを今でも鮮明に覚えている。ベトナムのスタッフ達は短い準備期間にもかかわらず、素晴らしい大会を実現してくれた。しかし、全てが支障なく進んだわけではない。私自身に関しては小さなトラブルもいくつかあった。それらのトラブルさえも、私の初めての海外でのエスペラント体験を彩る良い思い出である。

閉会式の後、寄せ書きの色紙が回ってきた。エスペラントに自信のない私は、親しくなった17歳の韓国人の Stano に、私のエスペラントに誤りがないか確認してもらった。その時にふと思いついて、「日本語を書くのはまずいかな」と聞いた。彼の返事は「Bona ideo.」私はエスペラントの文章の後に日本語で書き添えた。

「ありがとう、ベトナム」

Ponto de amikeco frateco amo

### Raporto de Mamiya Midori

Mi partoprenis en la UK kaj IJK. Komence mi zorgis pri mia mallerta Esperanto, ĉar ĉiuj aliaj partoprenantoj evidente parolis pli flue ol mi. Krome, mi ofte konfuziĝis pro frazoj, kiujn aliaj parolis, ekzemple kiam unu el la LKK-anoj demandis al mi: "Kiel vi fartas?"

Oni ne kredos la fakton, ke mi ne sciis, kion signifas tiu frazo. Ĝis la kongreso mi lernis Esperanton preskaŭ nur por legi novelojn. Tial mi ne sciis vortojn por konversacio.

Mi baldaŭ trovis grandan diferencon inter UK kaj IJK. En la UK oni instruis al mi diversajn vortojn, ĉar tie troviĝis multaj malnovaj esperantistoj. Tamen en la IJK, mi kaj aliaj junuloj reciproke instruis vortojn plurfoje, kiam iu ne komprenis gravan vorton.

Ekzemple, iam en manĝejo unu koreo petis al mi preni buŝtukon, sed tiam mi ne sciis, kion signifas la vorto, "buŝtuko". Li kaj najbaraj kune montris al mi tiun aĵon. Mi tiam eksciis la vortojn, kiuj estas ne nur "buŝtuko", sed ankaŭ "tuko". Aliffoje mi babilis kun li, tamen li ne komprenis la vorton, "supozas". Tial mi klarigis ĝin al li.

Tie mi sufiĉe ĝuis interparoli kun la partoprenantoj, kaj ni tuj amikiĝis. Tra interparolo mi lernis esprimojn por konversacio, kaj sukcese ekparolis pli flue ol antaŭe.

En la kongresejo troviĝis diversaj junuloj; kelkaj lernis por ekzameno, kaj aliaj fastis pro ramadano. Tra la tagoj en Vjetnamio, mi interesiĝis pri Azio, kaj aŭskultis diversajn parolojn de junaj esperantistoj: En Pakistano oni parolas pli ol 70 lingvojn. Prononco de la indonezia lingvo similas al la japana, ekzemple "sama-sama" signifas "Otagai-samadesu" en la japana.

Pere de Esperanto mi tuŝis iom da partoj de diversaj kulturoj. Kaj impresis min precipe vjetnamaj kulturo, historio kaj legendo. Vjetnamio iom post iom ŝanĝiĝis tra longaj jaroj, kaj travivis plurajn militojn. Ĉinio iam igis vjetnamojn uzi ĉinajn literarojn. Post proksimume mil jaroj de tiam, Francio igis ilin forlasi la literojn kaj uzi alfabeton anstataŭe. Nuntempe Vjetnamio ŝanĝiĝis kiel sendependa regno, kiel venkinto kontraŭ koloniismo.

Mi vidis tie, ke budhistoj preĝas en ĉineska templo, kaj katolikoj preĝas en franceska katedralo. Asfaltita strato en Hanojo aspektis nuda. Multaj motorcikloj iris sur la strato.

Estis troveblaj ankaŭ antikvaj legendoj en la moderna ĉefurbo: lago de drako, rakonto de junulino simila al Cindrulino, ktp. Laŭ unu el legendoj salikoko fariĝis drako, kiam ĝi suprenrampis akvofalon. Laŭ mia impresio, la urbo provas malvesti sian fremdlandan vestaĵon, kaj fosi antikvan ruinon en sia lando.

Survoje al la montaro Ba Vi, troviĝas bela arbaro kaj vastaj rizkampoj kun rizo kiel verda ondo. Nia aŭtobuso iris preter la neforgesebla pejzaĝo. Tamen mi aŭdis de unu vjetnamino, ke rizkampoj iom post iom malaperas sub betonŝtonoj. Mi rememoris unu vorton el temo de la UK, "disvolviĝo".

La vorton oni povas interpreti diverse. Ankaŭ en estonteco ni devas interparoli kun alilandanoj pri ilia kaj nia socioj. Komunikado necesas por ni kaj por akiri diversajn vidmanierojn tra la mondo. Ankaŭ ni japanaj esperantistoj nepre devas partopreni diskuton por nia estonteco, mi kredas.

---

## Ĉu IJK estas internacia?

Dum la IJK en Vjetnamio mi pasigis multe da tempo ĉeestante ĉe la komitatkunsido de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Mi estas nek komitatano nek membro de TEJO, sed ankaŭ tiaj homoj rajtis aŭskulti la kunsidon. Kaj ni rajtis eĉ esprimi nian opinion, se permesite de aliaj komitatanoj, kvankam ni kompreneble ne havis rajton voĉdoni.

En iu tago la kunsido daŭris iom longe, kaj ni ne povis finigi tutan diskuton ĝis la planita tempo. Tial iu proponis, ke ni decidu per voĉdono, ĉu daŭrigu la kunsidon aŭ diskutu poste. Laŭ la programo de tiu tago, tuj sekvis kelkaj programoj inkluzive de la programero "Esperanto - movado de Azio", kaj troviĝis unu horo kaj duono da libera tempo antaŭ vespermanĝo. Sed multaj eŭropanoj preferis

### Eseo de Shinya MURAMATSU

daŭrigi la kunsidon. Pro la voĉdonita decido komitatanoj el aziaj landoj devis ĉeesti daŭre ĉe la komitatkunsido kaj ne povis partopreni sufiĉe en la programero pri movado en Azio. Kaj ankaŭ kiam mi partoprenis en la programero "Esperanto-movado en Afriko", tie troviĝis tre malmultaj homoj.

Vidinte tiujn scenojn, mi dubis, por kio la partoprenantoj venis al la kongreso. Supozeble amikiĝo estas unu el la gravaj kaj ĉefaj celoj de IJK, kaj kompreneble ĉiuj partoprenantoj povas ĝui interparoladon kaj komunikadon ekster la programo. Sed se multaj homoj kolektiĝas el diversaj landoj, ĉu tio plenumas la kondiĉon, ke IJK estas internacia? Se mi iam havos okazon partopreni en estonta IJK, tiam mi volas enketi pri tiu esenca demando.





### Ĝis la revido!!

Post la lastjara IJK, jam pasis ĉirkaŭ kvin monatoj. Kaj la tagoj fariĝis bonaj kaj neforgeseblaj memoroj por mi. Se mi volas rememori la varmajn tempojn en miaj koro kaj kapo, mi povas tuj rememori ilin. Ekz. kaj la tagoj, kiujn kune kun la partoprenantoj mi ridante ĝuis ekskurson kaj aliajn programerojn, kvankam ofte kaj daŭre pluvis dum la IJK, kaj iuj noktoj, kiujn de tempo al tempo ni kune iris eksteren ĝis lokoj iom malproksimaj de la kongresejo, estas rememoreblaj.

Dum la kongreso mi gajnis novajn kaj diversajn geamikojn danke al Esperanto. Sed malgraŭ ke mi kaj ili

### Eseo de Ĉe Juna

ambaŭ havas konton en Facebook, mi ne ofte kontaktas ilin, post kiam mi revenis al Japanio. Ĉar antaŭ ol mi partoprenis en iom da kunvenoj en Esperantujo, mi pensis, ke mi ne povos facile revidi eksterlandajn esperantistojn, kiujn mi jam vidis unufoje. Sed post duonjaro aŭ post unu jaro, mi revidis ilin en alia kunveno. Do, la penso jam ŝanĝiĝis jene: Esperanto igas nin revidi unu la alian en la mondo.

Mi vidos iam ie ankaŭ vin, kiu nun legas ĉi-eseon. Fartu bone. Ĝis la revido!



## ★ Intervjuo kun Nguyễn Thị Phượng (Flama Floro)



### Flama Floro

Prezidanto de Vjetnama Esperantista Junulara Organizo (VEJO).

Lasta jare 2012, VEJO sukcese okazigis IJKn. Krome, vjetnamaj esperantistoj inkluzive de Flama ankaŭ sukcese okazigis Universalan Kongreson nur du tagoj antaŭe. Kiel ili fortigis Esperantomovadon en sia lando? Prezidanto de JEJ, IWAMA Kyo intervjuis.

フラーマさんはベトナム・エスペラント青年機構 (VEJO) の代表。

昨年2012年、VEJOは国際青年大会を主催し成功裡に終えた。さらにフラーマさんを含めたベトナムのエスペランティストたちは、そのたった2日前に世界エスペラント大会を成功させている。彼らはどのようにして自国のエスペラント運動を高めたのか。JEJ代表 岩間響がインタビューを行なった。

### Intervjuis Kyo Iwama

Se estus nur instruado Esperanton al homoj, tio ne sufiĉas por movado. Sed ni bezonas ankaŭ organizi taŭgajn agadojn por junuloj, kiel ofte organizi ekskursojn, renkontiĝojn ĉiu monate aŭ po dumonate... En tiuj okazoj ĉiuj povus kune praktiki Esperanton kaj pli bonigi amikecon inter esperantistoj. Laŭ mi tio estas tre grava afero por kunlaborado. Kaj ni ankaŭ devas doni novan celon ene de agadoj, por ke ĉiuj kune klopodu.

Kaj pli granda celo por tiu ĉi instruado kaj lernado estas, ke ni mem preparas por ĉiam pretaj, kaj povus bonvenigi kongresojn, eventojn de Espranto al Vjetnamio.

Kaj fine: Mi tute konsentas kun vi. KS ĝis nun estas kiel la plej grava evento de junuloj en Azio. Tamen sajnas al mi, ke funkcio de KS ankoraŭ ne estas tre bone.

Ni bezonas oficialan regularon por KS.

Kaj pri flanke de vjetnamaj junuloj, mi – reprezentanto de VEJO – jam interparolis kun Vjetnama Espranto Asocio (VEA) en kunsido, kiu okazis pasinta dimanĉe, kaj mi ricevis konsenton kaj subtenon de VEA, ke VEJO aliĝu al membrulisto de KS kaj kontribui por tio. Vidante fortan Eŭropan movadon, ili havas Muzaikon kiel retradio de Esperanto, ili havas multajn interesajn eventojn kiel FESTO, JES, E-semajno..... Ankaŭ mi revas pri kongresoj de junuloj en Azio ^^

### — Kio estas la plej grava afero por okazigi IJK ?

Ĉiuj scias, ke granda evento kiel UK aŭ IJK okazas en iu lando, kies la movado pli fortiĝos. Ĉar la kongreso multe helpas propagandon pri la lingvo al lokantoj. Oni povas malfermi kursojn pri Esperanto por komencantoj cele trejni volontulojn, por ke ili helpu, kiam okazos kongresoj.

Dum kongreso, tiuj volontuloj havos ŝancon; labori per Esperanto, praktiki la lingvon, amikiĝi kun fremdajn geamikojn, vivi en Esperantujo... Tio estas la plej facila vojo por esti esperantistoj. Kaj por la movado, homoj estas la plej grava afero.

### — Kion vi dume faras por fortigi la movadon en Vjetnamio?

Post la kongresoj multaj homoj iam kontaktis al LKK de la UK kaj IJK, kaj ili demandis pri Esperanto, ĉar per gazetoj aŭ per televido ili scias pri nova lingvo, kiun neniam ili sciis antaŭe. Ili havas scivolemon por lerni pli.

Ni intencas malfermi novajn kursojn de Esperanto en Hanojo por instrui al homoj, kiuj havas intereson. Ankaŭ en universitato ni malfermas novajn kursojn por komencantoj. Kaj por volontuloj, kiuj iam servis por la kongreso, ni daŭre havas klason kun pli alta nivelo. En sama cele por instrui Esperanton ni ankaŭ volas prepari por novaj agadoj de junuloj.

### — IJK-konvokado por unu el la plej gravaj aferoj estas kio?

周知のように、UKやIJKなどの大きな行事はエスペラント(E)運動が高まりつつある国で催されます。大会は開催地の人々へのエスペラントの普及に大きく貢献するからです。大会中働いてくれるボランティアスタッフを育てることを目標にして、エスペラントの初心者講座を開くことができます。

大会期間中、ボランティアスタッフはいろいろな機会に恵まれます。エスペラントを使って働いたり、言語を実地に用いたり、外国人と友達になったり、エスペラントの世界を体験したり……それがエスペランティストになるための一番の近道なんです。そしてE運動のためには、人が一番大切です。

### — ベトナムのE運動をより強くするために今していることは何ですか？

大会後、多くの人々がエスペラントについてUK、IJKの地元大会組織委員会に訊ねてきました。彼らは新聞やテレビで、今までまったく知らずにいた新しい言語のことを知ったからです。彼らはもっと知りたいと熱心です。

私はハノイで、エスペラントに興味を持つ人たちに向けた新しい講座を開こうと考えています。大学でも私たちは新しい初心者講座を開いています。それから、大会でのスタッフ経験のあるボランティアたちのためにもっと高いレベルの講座も続けています。エスペラントを教えることと同じ目的で、新たな青年活動を準備したいとも考えています。

エスペラントの授業だけでは、E運動にとって十分ではありません。毎月、あるいは一月置きに遠足や会合を継続的に催すなど、若者のための有益な活動を組織することも重要です。その機会に皆がエスペラントを実践し、エスペランティスト同士の友情を深めることができます。私たちが共に活動するためにとっても重要なことだと考えています。そして皆で協力してゆくためには、活動の間に新しい目標も与えなければいけません。

大会やエスペラントの行事をベトナムにいつでも招待できるよう、常に自分たちの準備を万全にすることも、この授業と学習のための大きな目標です。

そして最後に、あなたの意見(KSを日本で催すこと)には賛成です。KSは現在まで、アジアの青年たちによる最も重要な行事として続いています。しかし私には、KSの機能はまだ十分に発揮されていないように思えます。

私たちにはKSのための規程が必要です。

ベトナムの青年たちに関わる話ですが、先週の日曜に行われた会議で、私はVEJOの代表としてベトナム・エスペラント協会(VEA)と話し、VEJOがKSのメンバーに加わって貢献するべきだとして、VEAから同意と支持を得ました。ネットラジオ Muzaiko や、FESTO、JES、E-semajno など多くの興味深い行事を有するヨーロッパの優れたE運動を見ながら、私もアジアの青年たちによる大会を夢見しています。



## ★ Intervjuo kun Veronika Poór de Muzaiko

Veronika Poór de Muzaiko partoprenis en la 68-a IJK, kaj tie ni kelkaj JEJ-anoj renkontis ŝin. Kion ŝi provis tiam tie?

intervjuisto: **Kyo Iwama**

Saluton el la mondo,

Ĉi-okaze, mi prezentas al vi unu esperantistinon, kiu estas Veronika el Hungario. Mi konatiĝis kun ŝi, kiam mi estis en Vjetnamio, kompreneble en la lasta IJK.

Laŭ mi ŝia unua impresado estis tre interesa, ĉar ŝi ĉiam kunportis sonregistrilon, kaj intervjuis partoprenantojn.

Tamen unue mi timis la aferon, ke ŝi petos intervjuon de mi. Ĉar mi ne ŝatas mian voĉon, jes verdire, kaj ĉar mi ne povas paroli flue. Sed fine mi akceptis ŝian peton por intervjui, kaj ankaŭ mi faris kelkajn demandojn al ŝi por nia organo, La Junuloj.

Kompreneble, ni babilis multe unu la alian. Kaj dank' al ŝi mi eksciis pri Muzaiko. Ĉu vi scias Muzaiko? Se ne, ne zorgu, ĉar en la lasta parto de ĉi tiu paĝo troviĝas la informo! Jen, estas mia demando kaj ŝia respondo. Legu kun plezuro, mi petas.

***Mi scivolas unu aferon. Post kiam vi intervjuis multajn partoprenantojn de la IJK, kiel vi sentis pri tio?***

Mi tre ĝojis pro la ebleco intervjui Esperantistojn el tiom da diversaj landoj, kiujn kaj kies opinion antaŭe mi ne aŭdis pro la geografia malproksimeco.

***Kio estas la plej interesa afero por vi okaze de intervjuo dum la IJK?***

Tiun demandon estas tre malfacile respondi. Mi lernis multon el ili, ne nur pri la kulturo, pri la malsimilaj vidpunktoj, sed ankaŭ pri mia lingvouzo. Eble mi devas tion klarigi: ĉar mi kutimis uzi Esperanton en Eŭropo, homoj ofte komprenis min malgraŭ ke mi faris erarojn, en Azio mi lernis ke mi devas korekte kaj laŭeble ekzakte min esprimi – mi esperas ke mi sukcesos pri tio atenti ankaŭ en la estonteco.

Se mi devas elekti ion plej interesan, mi elektus la malsimilajn vidpunktojn. Mi plurfoje surpriziĝis pro la respondoj al miaj demandoj, ĉar mi neniam imagintus ilin laŭ mia vivsperto. Feliĉe, kiam oni intervjuas, homoj tre volonte respondas demandojn, do mi povis facile demandi pri la detaloj.

***Ordinare post kiam vi gajnis multe da voĉo de aliaj homoj, ĉu via ideo ŝanĝiĝas aŭ ne? Se jes, kiel via vidpunkto ŝanĝiĝas?***

Jes, mia ideo ofte ŝanĝiĝas post la intervjuoj, mi multon lernas dank'al ili – dankon al la intervjuitoj! Pripensante, kutime ne la signifoj de la vortoj ŝanĝas mian ideon, sed komprenante kial ili diras ion. Bedaŭrinde ofte okazas, malgraŭ ke mia ideo ŝanĝiĝas, mi ne sukcesas ŝanĝi tuj mian agmanieron – por mi daŭras longe por ne nur scii, sed ankaŭ agi laŭ la novaj informoj kaj vojoj.

***Mi pensas, ke post la IJK agado de Esperanto en Azio kreskas iom post iom. Do, laŭ via vidpunkto, kio estas grava por fortigi movadon de Esperanto en Azio same kiel en Eŭropo?***

Mi jam tre ĝojas pro la pluraj kongresoj organizitaj en Azio, tio estas tre subteninda. Aldone, mi kredas, ke la plej grava estas konscii, ke indas agi, eĉ se oni ne certas pri la rezulto. Tion mi ankaŭ lernis nur antaŭ kelkaj jaroj, kaj relegante mian vivresumon videblas la ŝanĝo: mi multe pli faris kaj sukcesis ekde tiam!

Ekzemple, mi fondis Esperantan universitatan grupon, (kiam mi proponis tion al la vicprezidanto de la studentaj asocioj, li respondis, “Ah, tio estas la plej bona ideo, kion mi aŭdis ĉi-jare!”) kaj jam du homoj el ĝi partoprenis IJKn. Ĉar mi tiam tre malbone regis Esperanton kaj ne vere sciis kiel instrui, kaj kiel havi kontaktojn dise tra la mondo, mi petis helpon de mia instruisto, kiu tuj sendis al mi multajn konsilojn.

Pro mia propra sperto mi tre ĝojas, ke nun helpe de pluraj homoj kaj organizoj ekkreiĝas centra helppaĝo por Universitataj Grupoj – do mi konsilas vin krei Universitatan (aŭ lokan) grupon kie ajn vi povas, kaj instruu Esperanton! Esperanto donis al vi ĝojon, do kial ne ebligu al aliaj sperti la samon?

***Bonvolu sciigi vian laboron de Muzaiko al homoj en nia lando.***

Mi volontulas por Muzaiko (la Esperanta retradio, kiu elsendas muzikon, babiladon, novaĵojn kaj reklamojn dum la tuta tago) diversmaniere. Mi ofte laŭtleĝas, intervjuas, muntas, organizas, komunikas kaj kunligas, sed kion mi plej ŝatas fari: paroli pri ĝi!

Ĉar se vi pripensas, ke ĝis nun sen ekstera helpo, homoj el multaj landoj kreas kunvolontule tiom diligente, ke ĉiutage aŭskulteblas elsendoj – tio estas nekredebla! Kompreneble tion ne eblus atingi, sen la sento de bonetosa kunlaboro kiun vi kaj viaj legantoj ankaŭ tre bonvenas partopreni. Ĉiuj povas helpi ĝin, kiuj scipovas Esperanton (almenaŭ B2 nivelo) kaj havas tempon. Kaj por esti la plej bona eble, necesas ĉies kunlaboro!

Vi povas sendi retmesaĝon al [info@muzaiko.info](mailto:info@muzaiko.info), aŭ legi ĉe <http://muzaiko.info/partoprenu> kaj en la vikio de Muzaiko: <http://vikio.muzaiko.info> kaj poste aliĝi al la retlistoj de Muzaiko!



**Muzaiko**

### 2013年度JEJ役員選挙の投票方法

今回は、編集に2名の立候補がありましたので、各候補者に対する信任投票をおこないます。  
選挙権のある方(2013年1月14日までに会費を納入済みの JEJ 正会員)には、次のものを同封してお送りしました。

- ・投票用紙
- ・投票用の小さな内封筒
- ・郵送用の大きな外封筒

これらを、次のようにして選挙管理委員会宛てに郵送して下さい。  
選挙は無記名投票でおこないますので、「投票用紙」と「内封筒」には名前を書かないで下さい。

1. 「投票用紙」に書かれている各候補者の名前の横に、信任する場合は○を、信任しない場合は×を書いて下さい。
2. 記入した「投票用紙」を「内封筒」に入れて封をして下さい。
3. 「内封筒」を「外封筒」に入れて封をして下さい。
4. 「外封筒」の裏に自分の住所、氏名を書き、投函して下さい。

投票の締切は **2013年2月4日(月)**(当日消印有効)です。  
JEJ の規約に従い、有効投票数の過半数の信任が得られれば可決となります。

### Kiel elekti estraranojn de la jaro 2013

Ĉi-foje kandidatiĝas 2 homoj por redaktoro. Sekve ni petas vian voĉdonon pri konfido al la kandidatoj.  
Ni kunsendis jenajn aĵojn al tiuj, kiuj havas balotrajton. (Regulaj membroj de JEJ, kiuj pagis sian membrotizon ĝis la 14-a de januaro.)

- \* Balotilo
- \* Malgranda koverto por voĉdono
- \* Granda koverto por poŝto

Bonvolu poŝte sendi ilin al la Elekta Komisiono laŭ jena maniero.  
Ne skribu vian nomon sur la Balotilo kaj la Malgranda koverto. La elekto okazos per sekreta baloto.

1. Desegnu markon apud la nomo de ĉiu kandidato sur la Balotilo: cirklon por konfidi, krucon por malkonfidi.
2. Enkovertiginte la Balotilon, fermu la Malgrandan koverton per gluo.
3. Enkovertiginte la Malgrandan koverton, fermu la Grandan koverton per gluo.
4. Skribinte viajn adreson kaj nomon sur dorsa flanko de la Granda koverto, enpoŝtigu ĝin.

La limdato de la voĉdono estas **la 4-a de februaro 2013** (laŭ dato de stampo).  
Laŭ la regulo de JEJ, la rezulton de voĉdono decidus la opinio de pli ol duono de la validaj voĉoj.



# 選挙公報

氏名

Ugo Jose LACHAPELLE

立候補する役職

編集 (Radaktanto)

立候補の年齢 27歳

立候補の理由、抱負

Mi laŭpove deziras agadi plu por Esperanto en Japanio kaj samtempe plivaste. Kiel Redaktanto, mi povos plifacile agadi el mia nuna loĝloko Tojama. Samtempe, mia alilanda sperto kaj mia alilanddeveneco povas, laŭ mi, plifortigi la agadon ĉi-tie en Japanio.

Finfine, laŭ mi, plejgrave estas ke por bona agado necesas bonan teamon kaj mi celas konstrui tiun bonan teamon kun la aliaj estraranoj.

氏名 (ローマ字表記)

間宮 緑 (MAMIJA Midori)

立候補する役職

編集 (Radaktanto)

立候補の年齢 28歳

立候補の理由、抱負

編集という仕事は刊行物にとって最も重要です。誌面をより深く濃いものにしてゆくと同時に、著者の文法上、表記上の誤りも正しい知識をもって直さなければなりません。この重要な仕事を円滑に行うためには、少なくとも三人の編集者が必要だと私は考えます。

エスペラントで書くということは、あらゆるエスペラントが読者になりうるということです。ですから、誌面には多様な記事を盛り込むべきだと私は考えます。例えばエスペラントで書かれた本に対する書評、要約、批評などは様々な人の関心を惹くのではないのでしょうか。私はまた、エッセーのような記事にはその人なりの考えや思想が必須であると考えます。もし単なる自己満足的な記事によって読者の関心を失ってしまったら、それを取り戻すことは困難だと思うからです。

## ★ Kiel laboras estraranoj de JEJ?

aŭtoro: **Ĉe Juna**

Ĉu vi scivolas, kiel laboras estraranoj de JEJ?

Ni estraranoj estos tre ĝojaj, se vi havas tiun demandon. Ĉar tio signifas, ke vi havas intereson pri laboroj de JEJ, ĉu ne?

Do, mi montru ĝin simple por solvi la scivolemon!

Ĉi-sube estas protokolo de nia kunsido la plej lastatempa. Kiamaniere la protokolo naskiĝis?

Ni ofte utiligas Skajpon por interparoli pri agado de JEJ. Unue ni retroŝte decidus temon, tagon kaj tempon por kunsido. Kaj ni diskutas en la decidita tago. Sekretario dume skribas protokolon kaj poste sendas ĝin al aliaj.

Nia diskuto estas ne malfacila. Ankaŭ vi tuj povos

partopreni.

En kunsido de estraranoj, ni precipe temas pri nia organo "La Junuloj" kaj eventoj en Esperantujo kaj aliaj. Sed vi devas memori, ke tio estas nur eta parto de nia laboro. (Tamen ne zorgu pri tio, ĉar vi povos akiri bonan sperton kaj esperantan kapablon dank' al tio.)

Ĉu vi volas labori ĝuante Esperanton? Do, ni kune laboru!

Kvankam jam venis venonta voĉdono por NOVA JEJ, tamen vi povos kandidatiĝi post 1 jaro. Unue vi vidu JEJn kaj post tio vi kandidatiĝu, se vi havis intereson pli multe ol antaŭe.

Ni estraranoj ĝoje atendas vian partoprenadon.

La Tago : la 14a de Januaro 2013

La tempo : 19:00~20:28

La ĉeestantoj : Juna, Mamija, Muramatsu, Iwama

[Pri venonta "La Junuloj", nome n-ro 97]

Ni eldonos ĝin en la 21a de Januaro.

La temo: IJK kaj klarigo pri la voĉdono

\*Ni devas kune sendi "elektorajtan paperon"

Enhavo: Iwama, Juna kaj Tsukimori

Redaktado: Mamija

Desegno: petu al s-ro Jaĝima

Presado: Tsukimori aŭ Iwama aŭ Muramatsu

\*En la 16a aŭ 17a: Iwama iros preni paperojn de kandidatoj al

JEI.

\*Ni sendos tiu ĉi numeron al membroj de JEJ, nome pagantoj.

[Pri "La Junuloj" n-ro 98]

Ni eldonos ĝin en la 21a de Februaro.

La temo: KS kaj nova JEJ

Raportoj: Ni ricevis kelkajn raportojn de la partoprenantoj.

Intervjuo: Juna intervjuos s-ron Ĵon.

\*Ni sendos tiu ĉi numeron al ĉiuj partoprenantoj.

[Venonta kunsido]

Je la 21:00 en la 19a de Januaro.